

*O esperanto e a desinformação*  
*Março/2002*  
**Esperanto kaj misinformiteco**  
**Marto/2002**

*Desde que comecei a estudar a lingua internacional esperanto, em julho de 2001, tenho ouvido freqüentemente que ela é a lingua da "nova era" (movimento místico e esotérico que tem apavorado muitos evangélicos pelo mundo afora).*

**De post kiam mi ekstudis la internacian lingvon Esperanto, en julio 2001, mi daŭre aŭdas, ke ĝi estas la lingvo de "Nova Erao" (mistika kaj esotera movado, kiu timigas multajn evangeliistojn tra la mondo).**

*Também soube que um pastor de uma das maiores denominações evangélicas do Brasil recebeu uma "revelação" em que o esperanto lhe foi apresentado como a língua que o anti-cristo vai falar. Parece que os esperantistas estarão muito mal acompanhados! Por essas e outras, o esperanto não deveria ser aprendido e falado pelos cristãos.*

**Mi eksciis ankaŭ, ke iu pastoro, el unu el la plej multmembraj brazilaj evangeliistaroj, ricevis "revelacion" en kiu Esperanto prezentigis al li kiel la lingvo, kiun Antikristo parolos. Laŭŝajne la esperantistoj estos vere fiakompanataj! Ĉi ĉial, la kristanoj ne devus lerni kaj paroli Esperanton.**

*Mas eu penso que o anti-cristo e os adeptos da nova era também falarão o português, o inglês, o francês, o alemão, o grego e muitas outras línguas. Eles falarão o latim. Falarão inclusive o hebraico. Se o fato de uma língua ser usada por eles deve determinar a cessação de seu uso pelos cristãos, penso que os membros fiéis das igrejas ao redor do mundo ficarão mudos! O que a Palavra de Deus diz é que "à besta foi dada uma boca para falar palavras arrogantes e blasfemas" (Ap 13.5). Minha convicção é que ela vai falar isto em todas as línguas, para que todos a entendam. Quando o representante de Láquis, rei da Assíria, foi aos arredores de Jerusalém para atemorizar os judeus durante o reinado de Ezequias, a língua usada por ele foi a que todos entendiam:*

**Mi tamen opinias, ke Antikristo kaj la adeptoj de Nova Erao same parolos la portugalan, la anglan, la francan, la germanan, la grekan kaj multajn aliajn lingvojn. Ili parolos la latinan. Ili parolos ankaŭ la hebrean. Se la uzo de iu lingvo, fare de ili, signifus la ĉeson de uzo fare de kristanoj, mi kredas, ke la fideluloj de la eklezioj ĉirkaŭ la mondo fariĝus mutaj! La Dia Parolo diras, ke "al la besto doniĝis buŝo por paroli arogantajn kaj blasfemajn parolojn" (Ap 13.5). Mi estas konvinkita, ke la besto tion parolos en ĉiuj lingvoj, por ke ĉiuj komprenu ĝin. Kiam la reprezentanto de Laĥiŝ, reĝo de Asirio, iris en ĉirkaŭaĵon de Jerusalemo por timigi la judojn dum la regado de Ĥizkija, la lingvo uzita de li estas tiu, kiun ĉiuj komprenis:**

*"Então Eliaquim, filho de Hilquias, Sebna e Joá disseram ao comandante de campo: Por favor, fala com teus servos em aramaico, porque entendemos essa língua. Não fales em hebraico, pois assim o povo que está sobre os muros o entenderá. O comandante, porém, respondeu: Será que meu senhor enviou-me para dizer essas coisas somente para o seu senhor e para você, e não para os que estão sentados no muro, que, como vocês, terão que*

*comer as próprias fezes e beber a própria urina? Então o comandante levantou-se e gritou em hebraico: Ouçam a palavra do grande rei, o rei da Assíria!" (2 Rs 18.26-28).*

**"Tiam Eljakim, filo de Hilkija, kaj Ŝebna kaj Joah diris al Rabŝake [la komandanto]: Volu paroli al viaj sklavoj en la lingvo Siria, ĉar ni komprenas; sed ne parolu kun ni Jude antaŭ la oreloj de la popolo, kiu estas sur la murego. Sed Rabŝake diris al ili: Ĉu al via sinjoro kaj al vi sendis min mia sinjoro por diri tiujn vortojn? Ĉu ne al la homoj, kiuj sidas sur la murego, por manĝi sian ekskrementon kaj trinki sian urinon kune kun vi? Kaj Rabŝake stariĝis, kaj ekkriis per laŭta voĉo Jude: Aŭskultu la vortojn de la granda reĝo, la reĝo de Asirio!" (2 Reĝoj 18.26-28).**

*O problema não está no idioma. Os representantes do mal sempre usarão o que for mais apropriado para se fazerem entender, seja o esperanto, o sânscrito, o russo, o coreano, o espanhol ou qualquer outro. E se o anti-cristo vai usar o esperanto, é melhor que o estudemos; assim, poderemos entender o inimigo e alertar os incautos, na sua própria língua. Quando Deus resolveu vir à terra para salvar a humanidade, usou as línguas faladas na época e nos lugares por onde andou: o grego koine, o aramaico e o hebraico. A única forma de as pessoas se entenderem é falando a mesma língua, seja ela qual for. Até mesmo no fenômeno das línguas estranhas faladas nas igrejas, a recomendação bíblica é que haja intérprete: "Assim acontece com vocês. Se não proferirem palavras compreensíveis com a língua, como alguém saberá o que está sendo dito? Vocês estarão simplesmente falando ao ar. Sem dúvida, há diversos idiomas no mundo; todavia, nenhum deles é sem sentido. Portanto, se eu não entender o significado do que alguém está falando, serei estrangeiro para quem fala, e ele, estrangeiro para mim [...]. Por isso, quem fala em uma língua, ore para que a possa interpretar" (1 Co 14.9-11, 13).*

**La problemo ne kuŝas en la lingvo. La reprezentantoj de malbono ĉiam uzos la plej taŭgan lingvon por komprenigo, ĉu Esperanton, la sanskritan, la rusan, la korean, la hispanan, kiun ajn. Kaj se Antikristo uzos Esperanton, ni des pli lernu tiun lingvon; tiel ni povos kompreni la malamikon kaj averti la neatentajn en ties propra lingvo. Kiam Dio decidis veni al la tero por savi la homaron, Li uzis la lingvojn tiam parolatajn en la lokoj, kiujn li trairis: la kojngrekan, la aramean kaj la hebrean. La sola formo por ke homoj interkompreniĝu estas paroli la saman lingvon, kiun ajn. Eĉ en la fenomenoj de fremdaj lingvoj parolataj en preĝejoj, la Biblia rekomendo estas, ke oni havu interpretiston: "Tiel ankaŭ vi, se vi per la lango ne donas parolon facile kompreneblan, kiel oni scios, kio estas parolata? Ĉar en la aeron vi parolus. Eble estas tiom da specoj de voĉoj en la mondo, kaj nenia estas sensignifa. Se do mi ne scios la signifon de la voĉo, mi estos, rilate la parolanton, barbaro, kaj la parolanto estos por mi barbaro. [...] Tial kiu parolas per lingvo, tiu preĝu, ke li interpretu". (I Korintanoj 14.9-11, 13).**

*Apesar da desinformação e do preconceito de alguns, vou continuar estudando a língua internacional e continuar lendo minha Bíblia em esperanto. Não há problema algum em se conhecer uma nova língua: "O Soberano, o Senhor, deu-me uma língua instruída, para conhecer a palavra que sustém o exausto" (Is 50.4). E se o anti-cristo e seus asseclas usarem o esperanto, tudo bem; no dia do juízo final, será também em esperanto que eles ouvirão acerca da glória do Senhor (cf. Is 66.18).*

**Malgraŭ la misinformiteco kaj antaŭjuĝemo ĉe iuj, mi plu lernos la internacian lingvon kaj plu legos mian Bibliion en Esperanto. Ne estas ajna problemo scipovi plian lingvon: "La Sinjoro, la Eternulo, donis al mi langon instruitan, por ke mi povosciu vigligi per vorto la senfortigiton" (Jesaja 50.4). Kaj se Antikristo kaj ties subuloj uzos Esperanton, en ordo; en la tago de lasta juĝo ankaŭ en Esperanto ili aŭdos pri la Sinjora gloreco.**

*Deus o abençoe rica e abundantemente.*

**Dio riĉe kaj abunde benu vin.**

+*Bispo Moreno*

+**Episkopo Moreno**

*A tradução do português para o esperanto foi feita por James Rezende Piton, a quem o bispo Moreno cordialmente agradece.*

**El la portugala lingvo esperanten tradukis James Rezende Piton, al kiu episkopo Moreno elkore dankas.**

*Informações sobre o esperanto: <http://esperanto.net/>*

**Informoj pri Esperanto: <http://esperanto.net/>**

*Nota: as citações bíblicas em português são da NVI - Nova Versão Internacional.*

**Noto: la bibliaj citaĵoj fontas el la Esperanta versio eldonita de Brita kaj Alilanda Biblia Societo.**